

Hector Hodler, 2-a parto : La Blua Lingvo de Léon Bollack  
Claude Gacond, 345-a radioprelego, 1970.05.20 & 23

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoregaj verkistoj. La pasintan semajnon ni diris kelkajn vortojn pri la malgaja infaneco de Hector Hodler. Ni ankaŭ vidis, ke antaŭ ol sin profunde dediĉi al esperanto, Hector Hodler provis praktiki kun sia gimnazia kamarado Edmond Privat du aliajn projektojn de internacia lingvo : Idiom Neutral kaj la Blua Lingvo de Léon Bollack.

A.- Estas interese ĵeti rigardon al tiu Blua Lingvo, kiu en la komenco de nia jarcento estis kontraŭmetita al esperanto kaj permesis al la ĵurnalistoj kredigi al vasta publiko, ke esperanto havas teruran konkurencanton.

Cl.- Léon Bollack publikigis en 1899 verkon titolita *La langue bleue, langue internationale pratique, théorie complète* [*La Blua Lingvo, internacia lingvo praktika, kompleta teorio*]. Tiu 500-paĝa libro pruvis, ke neniuj internacia lingvo sukcesis ĝis tiam, ĉar ili ne estis konstruitaj laŭ la logiko de firma filozofia analizado. Léon Bollack pruvas, ke la tradicia gramatiko estas nelogika, kaj li teorie imagas absolute logikan sistemon. Poste el tiu teoriaĵo li provas verki regulojn kaj vortaron. Kaj fine li pruvas verki tekstojn obeante al tiuj reguloj kaj uzante tiujn vortojn.

A.- Ni troviĝas antaŭ klopodo absolute inversa al tiu de Zamenhof. En la verkoj de la aŭtoro de la internacia lingvo esperanto vi vane serĉos prilingvan teoriumadon. Zamenhof komparis lingvojn apartenantajn al pluraj lingvo-familioj. Kaj tion li povis fari, malgraŭ sia junaĝo, ĉar li estis pola-rusa judo. Li konis la polan, la hebrean, la jidan, sed en la lernejo li studis pere de la rusa, germana kaj franca kaj li lernis la grekan kaj latinan. Malmultaj aŭtoroj de internaciaj lingvoj vere praktikis tiom da lingvoj. Kutime ili kontentiĝis kompari vort-listojn, ĉar ili kredis, ke lingvoj estas antaŭ ĉio vortoj.

Cl.- Por Zamenhof lingvo estas gramatiko, vortfarado. La vortoj sin submetas al tiu gramatiko kaj vortfarado. Li komprenis, ke en la lingvoj estas arbitraĵoj, tio estas la gramatikaj morfemoj. Sed li konstatis, ke malantaŭ tiuj vorteroj, prefiksoj, sufiksoj kaj kompleksaj reguloj kun multaj esceptoj, sin kaŝas simplaj kaj regulaj lingvaj fenomenoj. Kaj li konstatis, ke ili dependas de la ĝenerala homa pensmaniero aŭ psikologio.

A.- Verkante esperanton Zamenhof provis konkretigi tiujn lingvajn fenomenojn. En tio lia lingvo estas internacia kaj el tio ĝia sukceso.

Cl.- Léon Bollack, laŭ la franca abstraktemo kaj filozofiemo, ne estis pretigita por scienca esploro. Anstataŭ observi, kompari, elprovi, li kontentiĝis teoriumi.

A.- Kiel bona filozofo li unue difinis sian pozicion. Jen kion li skribas komence de la verko *Résumé théorique de la langue bleue* [*Teoria resumo pri la Blua Lingvo*] aperigita en 1899 :

Cl.- « *Ĉiuj gentoj en la universo ne egale sentas la bezonon interkomuniki ; estas neutile alporti [lingvon internacian] al tiuj, kiuj ĝin malmulte uzus. Mi do pritraktos kiel studkampon la nurajn naciojn de la arja raso.* »

A.- Tio signifas, ke por Léon Bollack nur la arjaj lingvoj valoras atentemon de lingvisto, kiu intencas verki projekton de internacia lingvo. Kaj en liaj notoj oni malkovras, ke li rezignis okupiĝi pri la slavaj lingvoj pro ilia nelatina alfabeto.

Cl.- Post tiu geografia limigo ni alvenas al alia limigo multe pli grava.

A.- Léon Bollack pruvas difini la intelektan rolon de internacia lingvo. Jen liaj asertoj :

## Hector Hodler, 2-a parto : La Blua Lingvo de Léon Bollack

Claude Gacond, 345-a radioprelego, 1970.05.20 & 23

Cl.- « *La homaro ne deziras posedi internacian lingvon, kiu estas kapabla esprimi ĉiujn sentimentojn ; la neceso de tia organo*

A.- internacia lingvo

Cl.- *estas sentata nur por la manifestado aŭ esprimado de la tuto de la sociaj rilatoj. [...] En la nuna stato de la civilizacio komuna lingvo rajtas esti nur dua idiomo. »*

A.- Por Léon Bollack tio signifas duaranga idiomo. Ni daŭre citas lin :

Cl.- « *La devizo de la Blua Lingvo : **dovem pro tle, dua por ĉiuj**, klare indikas, ke ĝia sola ambicio devas esti la tradukado de la plej komunaj bezonoj, tiuj ĝuste kiujn implicas la vorto **komerco** en sia plej vasta signifo : Ĉiutagaj kaj merkataj rilatoj. »*

A.- Léon Bollack esprimas la tiaman oficialan vidpunkton pri la internacia lingvo. Kaj ni scias, ke en la dua Universala Kongreso okazinta en Ĝenevo en 1906 esprimiĝis la vidpunkto, ke esperanto devus esti nura lingvo. Kaj ni scias, kiom energie Zamenhof reagis kontraŭ tiu sinteno, kiun ni nomas praktikismo. Memoru liajn dirojn :

Cl.- « *El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas ĉiuj elŝiri el nia koro tiun parton de la esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto ! Ho, ne, ne, neniam ! »*

A.- Por nia juna Hector Hodler la trastudo de la Blua Lingvo signifis ekzamenon de tiuj vidpunktoj, fremdaj al esperanto kaj tiam ŝatataj de la franca intelektularo. Tiu praktikismo enkorpiĝos en 1907 en la lingvo Ido, kaj Léon Bollack tiam forlasos sian projekton por la lingvo de de Beaufront kaj Couturat. En la filozofio de Léon Bollack la rolo de la internacia lingvo estis multe pli limigita, ol nuntempa homo povus pensi. Ni ree citas lin :

Cl.- « *Tiu limigo ekskludas ĉiujn literaturajn pretendojn. Literaturo, kiu estas la reprezentanto de la sentimentoj la plej subtilaj propraj al ĉiu gento, ne povas trovi lokon en idiomo arte kreita de sola individuo. »*

A.- Kaj Léon Bollack tiel resumas sian laboron :

Cl.- « *Klopodi por verki artefaritan idiomon, kies celo estas oferti al la gentoj de arja raso interkomprenilon, kiu permesos al ili interŝanĝi siajn plej komunajn ideojn laŭ praktika maniero, ĉu parole, ĉu skribe. »*

A.- Nun ni komprenas, kial Léon Bollack ne povante akcepti esperanton, proponis alian lingvon. Li esti kontraŭ la ambicio de la zamenhofa disĉiplaro, kiu ne volis limigi la rolon de esperanto.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-